




1^a trimestro 2014

**En tiu numero
vi legos..**

Jane Pinon raportas pri la Zamenhofa tago en Le Mans...	p.1
... ŝi vizitis la Mu- CEM en Marsejlo	p.2 p.3
Denise kaj Jean- Louis Le Brizault klarigas Tajĝiĉjua- non	p.3 p.4 p.5
Jean-Jacques Mo- reau vizitis la kons- truejon de la ŝipo "Hermione" antaŭ sia vojaĝo al Irlando,	p. 5 kaj p. 6
Jeannine kaj Gérard Layseman tradukis artikolon pri la hiru- doj...	p. 6 p. 7 kaj p. 8
...ili ankaŭ proponas recepton de kuko.	p.8



Zamenhofa tago en Le Mans

Dimanĉon la 15an de decembro 2013, kvin esperantistoj el TOURS alvenis je la deka al rendevuejo.

Ĝoja tempo de akcepto en la salono P. Guedon en LE MANS, por renkontiĝi, babili kun amikoj de la regiono.

Sed mi miris pri multe da personoj nekonataj, moviĝantaj pri diversaj aferoj en ĉiuj lokoj.

Finfine mi komprenis : familioj invitataj de "Secours catholique" ĉeestos la prezentadon de "Ĉirkaŭ Karmena" ĉar kelkaj infanoj partoprenos la teatraĵon.

Je la 12a, tre bongusta tagmanĝo estas servita en bona restoracio de LE MANS.



La salono, post nia reveno en ĝi, estis preskaŭ plena de familioj

kun junaj infanoj relative bruaj.

Post la kristnaska sceneto destinata al familioj, la Koncerto-Konferenco : "Ĉirkaŭ Karmena" daŭris dum 2 horoj.

Klarigoj pri Karmena fragmentigis la tragedion en la franca lingvo. Muzika opero estas kantita en la esperanta .

La kvardek aktoroj de la ĥoro, rufe kaj nigre vestitaj, troviĝis funde de la scenejo.

Kvar baletistinoj elvokis Ciganojn. Kvar solistoj laŭvice vivigis la tragedion kun la ĥoro Interkant. Ĉio akompanita de pianistino.

Kia bela postagmezo ofertita de niaj amikoj de LE MANS.

Finfine ni tintigis la glasojn kaj adiaŭis al Interkant'.

Estis ilia lasta prezentado.

Jane Pinon



Marsejlo kaj la MuCEM

Mirinda arkitekturaĵo
de la XXa jarcento



I.- Evoluo de la marsejla haveno

En la XIX-a jarcento : oni duobligis enhavenon de la haveno konstruante norde de la « Malnova Haveno » la havenon de « La Joliette » (digoj, basenoj, doko : 360m de fasado). Inter la du havenoj staras la fortreso « Sankta Johano ».

- 1944 : explodo de germana depono de municioj detruis grandan parton de la fortikaĵo.
- Poste : vastaj hangaroj spikiĝis (J1,J2, J3,J4), kaj strangaj loĝejoj (F. Pouillon arkitekto).
- 1997 : moleo J4 estis eldetruita kaj restis malplena, polva.
- Poste, naskiĝis la EUROMEDITERANEA URBANIZAD-projekto (OIN=Operacio por nacia komunbono) inkluinta la restaŭgeco de J4, ĝia promenado kaj la bazo de la fortreso SANKTA-JOHANO. Estis vera renoviĝo de historiaj lokoj.

II.- Rudy RICCIOTTI

La arkitekto Rudy RICCIOTTI estis komisiita por realigi tiun projekton "reakordigi la urbon kaj la maron" post

konkurso en 2004.

- 2009: Meto de la unua ŝtono
- 2012: La 30-an de Junio kaj la 1-an de Julio, malfermo por granda publiko ĉe la konstruejo ; la MuCEM malkaŝiĝas.
- 2013: la 7-an de Junio, inaŭguro kaj malfermo de la MuCEM.

III.- La MuCEM

(Muzeo por civilizacioj de Eŭropo kaj de Mediteraneo)

Eltiraĵoj de intervjuo kun Rudy Ricciotti : "vorko"

1. La MuCEM estas grava parto de fasada aranĝo de la haveno de Marsejlo.
2. Estas kubo pensata kiel zigurato, kiun oni surgrimpas ĝis la supro, malrapida supreniro pasiganta de tero ĝis ĉielo por esti super akvoj kaj malkovri la havenon kaj la maron... nekredbla vidaĵo.
3. La MuCEM estas iu specia skatolo enskatoligita "unu koro kvazaŭ envolvita en mantilo kovranta la sudan kaj okcidentan flankojn". Tiu mantilo de B.F.U.P. (fibra betono kun ultragradaj karakterizaĵoj) estas teknologia materialo, rezultanta el serĉadaj desegnoj de R. RICCIOTTI kaj inĝenieroj de Lafarge dum deko da jaroj.
4. La MuCEM estas realizata kiel artvor-ko kaj apartenas al publikaj vorkoj kun



sperto, majstreco, novaj konstruteknikoj finpretigitaj de inĝenieroj, betonfabrikistoj.

IV.- KREADO DE LA RETO

Unue estas desegno borde de la maro.

Ĝi estas artefarita kun plakoj de B.F.U.P. de 6x3m kunigitaj surloke kun horloĝista precizeco.

R. RICOTTI diras : "Miaj konstruaĵoj necesas grandan lertecon, scipovon kaj laboradon. Ni estas manpleno da kompaniuloj, inĝenieroj, arkitektoj, entreprenoj por fabrikado. Tiun ĉi oni fabrikas, oni ne povas transloki ĝin.

Ĉio estis farita en fabriko de Vendarques apud Montpellier -franca fabrikado-Rezonado, laboro, ne tro peno, fakte plezuro."

Al demando : - Ĉu tiu teknika invento ŝajnas artistika korelverŝo ? li respondis : - Estas arto por konstrui, esprimo maksimuma de la materialo.

V. - GALERIO DE MEDITERANEO

La galerio montras je ĉirkaŭ 1600m² epopeon de dekmil jaroj.

Kvar sekcioj ilustras la historion de tiu baseno, de civilizacioj, de mediaj konestoj al religiaj serĉadoj, de la urbaj naskindoj al iliaj esploroj transmaroj ; ili rivelas homon kiel agrikulturisto, aŭ kredulo, aŭ civitano, aŭ malkovristo

Sekciaj titoloj en la Galerio :

- Kulturaj estaĵoj (homoj)
- Tri monoteismoj
- Civitaneco
- Pano kaj Dioj
- Ĉiuj vojaĝoj kondukas al Jerusalemo
- Civitaneco : malfacila lukto, konkero

Dokumentoj, objektoj, videaĵoj....instruas vizitantojn pri tiu longa historio.

Mi malkovris mirigita tiun lokon en Novembro 2013 sub luma ĉielo.

VI. - LA FORTRESO SANKTA JOHANO

En la fortreso Sankta JOHANO, estas festo.


En la kapelo, la gardista halo kaj la ofiera galerio, ekspozicio : la distritempo.

Festaj tagoj ritmas niajn vivojn ĉiusezone.

La itinero direktas la spektanton ĝis efemeraj magiaj cirkoloj kaj distraĵoj por ĉiuj ; inter klaŭnaĵoj kaj marionetaj teatraĵoj la MuCEM montras kaj mirigas .

Jane Pinon

Tajĝiĉjŭan : ĉina luktarto



Ni praktikas tajĝiĉjŭanon ekde tri jaroj kaj ni volas prezenti al vi kelkajn aspektojn de tiu ĉina luktarto.

Historio :

La historio de tajĝiĉjŭano estas de proksimume 400 jaroj, sed la filozofio

entenas taoismon, konfuceanismon, kaj ĉinan tradician medicinon. Laŭ la idealo, la homaro nature estas la konsistiga parto de la mondo. Tial por firme kaj stabile stari en la tero kaj sukcesi en batalo, oni devas radiki en la tero. Tial praktikantoj bezonas ekzerci sin per la pozo de starado kaj celas stari kiel rekta pino.

En ĉinio tajĝiĉjŭano estas ege populara, troviĝas multaj kursoj kaj kluboj, ĝin praktikas knaboj, junuloj, maljunuloj, viroj kaj virinoj . Ĝi estas bonvenigata ankaŭ de alilandanoj, do en la regiono de TOURS

oni povas trovi pluraj kluboj . Laŭ la statistiko nun en la mondo, tajĝiĉjuanon praktikas pli ol 100 milionoj da personoj el pli ol 150 landoj .

Avantaĝoj por la sano :

Ĝi estas milda kaj saniga sporto konforma al la fiziologiaj reguloj. Ĝi havas bonan influon al la centra nerva sistemo, plifortigas la funkcion de la kardiovaskula kaj spira sistemoj, reduktas la kongeston en la korpo kaj plibonigas la digestadon kaj metabolon. Dum la ekzercado, ĝi postulas altan koncentradon de la spirito, kio multe stimulas la funkcion de la cerbo. Tial laŭ la medicina vidpunkto ĝi estas gimnastiko saniga kaj kuracefika .

Rimarkoj :

Ordinare, oni povas fari la ekzercadon sur malplena grundo antaŭ aŭ post la laboro aŭ dum la laborpaŭzo. Se la cirkonstancoj permesas, plej bone estas, ke en frumateno aŭ vespero oni faras la ekzercadon en parko, arbaro aŭ en aliaj kvietaj lokoj kun freŝa aero.

Vidu la koloran bildon, laŭ la tajĝi la mondo estas cirklo, nome la stato tajĝi. Tial plej multaj movoj de tajĝiĉjuano estas arko kaj la mova orbito formas cirklon. La cirklo ne estas ebena, sed spaca, ŝajnas pilko.

Ekzemplo de movo :

Estu bone por fluente uzi la korpvortojn !!!!

Legu, vidu kaj se vi volas praktiki, provu !

KOMENCA TENIĜO (Bildoj 1 - 4)

1 - Rekte stari kun la piedoj disigitaj tiom larĝe, kiom la ŝultroj etendiĝas, kaj la brakoj mallevitaj ambaŭflanke de la femuroj. Rigardi antaŭen (Bildo 1)

Rimarkoj : Teni la kapon kaj kolon rektaj, kun la mentono iom malantaŭen. Ne tro elstarigi la bruston, nek tro tiri la abdome-




non internen. Liberigi la menson de ĉiaj pensoj.

2 - Horizontale levi la brakojn malrapide ĝis la sama nivelo kiel la ŝultroj, kun la manplatoj malsupren. (Bildoj 2 - 3)

3 - Teni la torson rekta, fleksi la genuojn kaj milde premi la manojn malsupren, kun la kubutoj pendantaj kontraŭ la genuoj. Rigardi antaŭen (Bildo 4)

Rimarkoj : Teni la ŝultrojn malsupren kun la kubutoj libere pendantaj, iom kurbigi la fingrojn, meti la korpan graviton inter la kruroj. Fleksi la genuojn, malstreĉi la talion kaj ne elstarigi la gluteon. La mallevo de brakoj devas akordiĝi kun la flekso de genuoj.



DISIGI LA SOVAĜĈEVALAN KOLHARARON UNUFLANKEN (BILDOJ 5 - 9)


1 - Turni la korpon iom dekstren kaj movi la korpan graviton sur la dekstran kruron. Dume levi la dekstran manon ĝis antaŭ la brusto, kun la manplato turnita malsupren. Arke movi la maldekstran manon dekstren kaj malsupren al malsupro de la dekstra mano, kun la manplato turnita supren, teni ambaŭ manojn unu kontraŭ la alia kvaŭzaŭ ĉirkaŭprenante pilkon. Tiri la maldekstran piedon al la dekstra, kun la piedpinto surtere. Rigardi la dekstran manon (Bildoj 5 -6)

2 - Turni la torson maldekstren kaj movi la maldekstran piedon maldekstren kaj antaŭen, fleksi la maldekstran genuon kaj rektigi la dekstran kruron sen levi la kalkanon.

Dume levi la maldekstran manon maldekstren kaj supren ĝis la sama nivelo kiel la okuloj, kun la manplato oblikve supren kaj la ku-



buto iom kurbigita, kaj mallevi la dekstran manon dekstren kaj malsupren apud la dekstran kokson, kun la manplato turnita malsupren kaj la fingropintoj antaŭen. Rigardi la maldekstran manon. (Bildoj 7- 8 - 9)



Denise kaj Jean Louis Le Brizault

La Hermione

Por atingi la ŝiphavenon en Roscoff, ni ĉirkaŭvojas al Rochefort por viziti la konstruejon de la trimasta velŝipo : la Hermione.

La konstruo okazas en la eksarsenalo, pli precize en la ripardoko konstruita en 1728 (elŝlimita en 1993). Teamo de spertaj ĉarpentistoj rekonstruas tiun maljunan velŝipon el la 18a jarcento « Fregato pri Libero » : 65 m longa, velaro de 1500 m², de 1200 t. La unua estis konstruita en 1778 laŭ la planoj de la inĝenerio Cévillard Aîné, en la arsenalo antaŭe kreita de Colbert, la ĉefa ministro de Ludoviko la 14a.

La 21an de Marto 1780, juna nobelo aŭvernja, la Markizo Marie-Joseph de La Fayette (1757-1837) surŝipiĝas sur La Hermione al kolonioj de la Nova Mondo. De 6 jaroj jam la usonaj kolonianoj revoluciantaj batalas kontraŭ la fideleculoj kaj la anglaj trupoj de la Reĝo Georgo la 3a por akiri la sendependecon.


Konante bone Usonon, La Fayette devis organizi kun Georgo Vaŝington kiu estis la ĉefa generalo de la juna usona armeo, la osan elŝipigon de la reĝaj francaj trupoj antaŭviditan en Julio 1780

en Newport.

La historia sekvo vidos surmaran batalon en Chesapeake, La Hermione partoprenos kaj venkos en Yorktown (1781) kaj permesos la sendependecon de Usono.

La Fregato pri Libero dronos la 20an de Septembro 1793 proksime de Le Croisic (Francio), post navigeraro.

De 1997, la rekonstruo de tiu trimasta velŝipo okazas vigle kaj ofertas al vizitantoj la eblecon malkovri la teknikojn de ŝipa konstruado en la 18a jarcento. Krom la historia laboro, forĝistoj, ĉarpentistoj, kalfatristoj devas trovi la lertecon, la elturniĝemon, la farscion, la manturniĝon de la laboristoj de tiu eksa epoko. La loka ŝipfarado daŭros verŝajne pli malpli 15 jarojn, tio permesos sekvi la etapojn de la rekonstruo. Post ĉirkaŭ 15 jaroj da laboro, simbola vojaĝo tra la Atlantika Oceano solenos la amikecon de Francio kun Usono, antaŭ ol La Hermione revenos al Rochefort, sia propra haveno.



TANDEMA VOJAĜO TRA IRLANDO

Preparita de unu jaro, tiu periplo kunigas 5 parojn kaj 1 kuŝtricklanton. Ni estas ĉiuj AC-Tanoj (Tandema Cikla Amikaro) kaj ni rendevuas ĉe bretonaj getandemistoj (2x70 jaraĝaj), la plej maljunaj kaj la plej rapidaj el ĉiuj.

Post bona nokto kaj bonega matenmanĝo, ni ekiras frue sub la pluvo, kvankam la vojiro ne estas longa, ni antaŭvidu la neantaŭviditaĵon.

Ni trakuras 1 km, mi sentas Marlène, kiu falas sur mian dorson, mia seltubo estas rompita, feliĉe, ni ruliĝis malrapide. Tuj ni telefonas al najbaro de niaj bretonaj amikoj, kiuj vigle riparas la tubon. Iom pli malproksime, la radakso de la triciklo rompiĝas. Denove, la neantaŭvidaĵo okazas. Post komuna decido, la kuŝtriklanto estas rekuperonta sian kamionon, kiu estas ĉe niaj amikoj. Afabla bretono kondukas lin. La kamiono estos tre utila ĉar ni metos en ĝin niajn remorkojn.

Antaŭ la enŝipiĝo ni bonŝancis renkonti laboriston de Brittany Ferries, li estas osa pensiulo kaj kuŝbiciklanto, li helpas nin por ŝanĝi bileton, ĉar nun ni havas kamionon.

Kiel kutime, la bicikloj enŝipiĝas la lastaj, atendante en la ventego kaj malvarmeĝo malantaŭ aŭtobuso.

La ŝipo nomiĝas « Pont Aven », ĝi foriras kun ni, en tiu momento mi kantas : « En Haven' de Pont Haven, la maristoj sen ĉagren... ». La komforto estas maksimuma.

Post bona nokto ni elŝipiĝas, kiel kutime, la lastaj. Mi forgesis, la tandemabileto kostas duoble pli ol tiu de biciklo, kvankam tandemo estas biciklo... ankoraŭ maljusteco.

Nun ni ĉiam pensu « STIRU MALDEKSTREN », kaj neniam forgesi tion.

CORK estas la tria irlanda urbo, ĝi entenas 200 000 loĝantojn. Ni trovas facile la junulgastejon, kiu ŝajne atendis nin por 2 noktoj. La urbo estas trafluata de la rivero LEE. CORK estas juna kaj viglega, ĉefe nokte ; la muziko « TRAD » (tradicia) kaj la kantoj ĉeestas.

Ekiro al COBH, la unua renkontpunkto kun la Kastelo Black Rock, kiu rigardas nin pasan-



Kastelo Black Rock

tajn. Ni devas transiri marbrakon prame.

La marfrunto viglas, ni renkontas la unuajn strataristojn. Unu parto de COBH situas sur roka sprono, kie staras katedralo. Hodiaŭ okazas la unuaj komunioj, la Irlandanoj estas tre katolikaj. La dua parto de la urbo situas marrande. COBH esti la lasta haltejo de la pasaĝerŝipo Titanic antaŭ sia tradegia drono. Ĉi-tie la



Haveno de Cobh

deklivoj estas tiel krutaj ke ni devu antaŭen puŝi la tandemon por ne retroiri. Afabla ŝoforo vidante, ke ni serĉas la taŭgan vojon gvidas nin per sia aŭto sur la dufoje trivojo. Estas permesata bicikli sur tian vojon. Dankon al li. Tio ofte okazos, tiel neniam ni timis bicikli. Por fini la tagon, ĉiuj iras trinki bierpindon en la klubdomon de la klubkriketo. La kriketludantoj deziras al ni varman bonvenon. La brakseĝoj el ledo ŝajnas atendi nin, la etoso estas nekutima.

J-J Moreau

(Daŭrigo de la vojaĝo sur venonta Turanĝia Luko)

La Hirudoj :

Medicino deziras ĝian revenon

Tiu hermafrodita vermo trapasis jarcentojn kaj preskaŭ malaperis. Ekde nun, ĝi estas ŝatita en la grandaj kirurgiaj modleblaj servoj de Francio kaj de Usono.

Prononcante nur ĝian nomon, la plejmulto el la homoj vidas siajn harojn hirtiĝi, siajn musklojn spasmigi, sia vizaĝo kuntiriĝi. Tamen, hirudo devus esti



kvalitigita kiel unu el la plej bonaj amikoj de homo. Certe ja, tiu malhela ringa vermo, kies buŝo simila al kupo kun tri makzeloj, kun kalkospataj dentoj kaj ĝiaj 5 paroj de okuloj, kiu venas suĉi vian sangon kiam ĝi povas, ne faciligas spontanin inklinon.

Tamen, ĝi estas dotita per multaj medicinaj kvalitoj : antikoagula, anesteza, kontraŭ-inflama, baktericida kaj malinfekta.

Serĉistoj, kiel la profesoro Michel Salzet de la universitato de Lille, moŝtulo en neŭrofiziologio, laboras ekde pluraj jaroj pri la medicinaj kvalitoj de tiu vermo kun fleksiĝema korpo sen vera skeleto. Estas « vera kemia uzino » ŝatas memori Jacques Baudet, estro de la servo de moldebla kirurgio de Bordeaux dum la jaroj 1970 ĝis 1990. Tiu, kiu en 1972, sukcesigis la unuan reenplanton de fingroj en la tuta Eŭropo, estis ankaŭ unu el la unuaj nuntempaj uzantoj de « *Hirudo medicinalis* », la latina nomo de tiu hirudo kun medicinaj povoj. Estas unu el la plej uzataj en Francio kiel eksterlande inter pli da 650 specoj, « sen kalkuli tiujn el Ĉinio, kiujn oni ne konas », subdiras Brigitte Latrille, prezidantino de Ricarimpex, societo de bredado kaj vendo de hirudoj, la sola en Francio.

En tiu epoko, kiam la senvertebra sango-vorulo estis malaperita de la ĉiutageco de la kuracistoj, « ni iniciatis uzon de hirudo en mikrokirurgio de reenplanto de fingroj kaj oreloj, en transporto de haŭtaj ŝirpecoj, ĉiufoje, kiam okazis vejna kongesto », klarigas la pioniro Jacques Baudet.

Lia posteulo, Philippe Pélissier, en universitata hospitala centro sekvas la saman protokolon kaj « konservas bokalon de hirudoj tuj uzeblaj en la faka fridujo ». Ekde nun, la parazito de vertebruloj, por la plejbonaĵo pli ol la malbonaĵo, estas uzata en dekoj da hospitaloj, klinikoj, ĉefe en mikrokirurgio.

Historie, la Ĉivila Kodo, ekde sia kreado en 1804, devigis hospitalan apotekon konstante havi hirudojn je dispono de kuracistaro. Tiu devo estas ankoraŭ aktuala.

Minacitaj de malapero

Sed, oni multe malpli uzas ilin ol en la 17a,



18a kaj, ĉefe, la 19a jarcentoj, kiam la besto estis tiel bone konsiderata, ke ĝi servis por flegi ĉion aŭ preskaŭ, eĉ se ĝi ne estis la taŭga rimedo : lokaj inflamoj, iskiatalgioj, artrozoj, flebitoj, tendenitoj, hipertensioj, reŭmatismoj kaj ĉiaspecaj febroy, sed ankaŭ hemoragioj, hemoroidoj, glaŭkomoj, diabetoj, psoriazoj aŭ poliomjelitoj. En sia medicina tezo pri « terapioj per hirudoj » (universitato de Franche-Comté, 2005), Marie-Luce Jardin rakontas, ke en la jaroj 1830, oni uzis 5 ĝis 6 milionojn de hirudoj ĉiun jaron. Oni importis ilin ĉefe el Hungario. Ĉe frizisto-barbiero aŭ ĉe la cara korto, la hirudo estis reĝino !

Malplaĉa flanko de la afero, la speco estis « malfortigita pro senpensita kolekto dum la 19a jarcento », klarigas Marie-Luce Jardin. Konsekvencoj pli da unu jarcento poste : la speco estas minacita de malapero kaj enskribita en Internacia Konvencio de Washington. Hirudo estis ankaŭ diskredita pro ekcesaj preskriboj faritaj en tiu epoko : pacientoj mortis anemitaj post suĉado de 30 aŭ 40 hirudoj, ĉiu glutante 50 gramojn da sango.

Dum pluraj jardekoj, oni ne plu parolis pri ili. Nur maljunuloj plu surmetis ilin sur si mem. Ekde kelkaj jaroj, terapistoj rekomencis uzi ilin : osteopatoj, naturistoj kaj malpli ofte ĝeneralaj kuracistoj. Necesas diri, ke hirudo ne plu estas repagita de Sociala Asekuro ekde

1972 kaj ĝia preskribo malaperis de medicina kodekso.

Oni paŭtignoras ilin en kuracarto, oni fuĝas de ili en la naturo, kiam ili estas gardostarantoj de poluado : ili estas vundeblaj de poluaĵoj, kiel pesticidoj kaj agrikulturaj herbicidoj, de klimata revarmiĝo, kiu provokas sekigon de humidaj areoj (ilia prefera vivloko) kaj malaperon de ranoj (privilegiaj gastoj de junaj hirudoj).

Post sato, iuj kapablas resti ĝis 2 jaroj sen manĝi. «Ili havas malrapidan metabolon», konfirmas Adrien Bajoux, ŝarĝita de bredado ĉe Ricarimpex. Vintre, ili enprofundiĝas en ŝlimon por vintrodormi kaj eliras nur je la unuaj printempaj sunradioj. «Ne estas rare vidi ilin revarmiĝi sur folioj aŭ nimfeoj», iam notis la juna hirudbredisto.

Malnovaj skribaĵoj diras, ke ili povas vivi je tiu ritmo dum 20 ĝis 30 jaroj. Sed, neniu profesiulo konservis ilin malliberaj tiel longe por kontroli.

Sola en amaso

Videbla paradokso : hirudo vivas kun siaj miloj da samspeculoj, sed sociale, ĝi estas solecema. «Escepte, kiam unu el ili nervoziĝas aŭ streĉiĝas, ĝi povas transdoni sian streĉon al la aliaj kaj en tiu momento hirudoj atakas unu la alian», eksplikas Brigitte Latrille. La ununura momento, kiam tiuj oviparaj senvertebruloj havas minimumon da socia vivo estas somere, kiam ili pariĝas. Graveda, hermafrodita besto demetas ovojn en spongecan, okrkoloran kokonon, kiun ĝi formis kaj metis en humidan grundon. Unu monaton poste, 10 ĝis 30 hirudidoj eloviĝos.

Sed, laŭ Brigitte Latrille, eksĉampionino de skermo, kiu bredas hirudojn ekde 20 jaroj, la besto konservas ankoraŭ multajn «misteriojn» : eĉ ni, ni ne ĉiam komprenas ĝian konduton kaj ni ankoraŭ ne scias kiamaniere ĝi funkcias kaj la kialojn de ĝiaj agmanieroj. Ankoraŭ restas tiom da malkovrindaĵoj.

4 farmoj de bredado en la mondo

Hirudoj, specoj sensivegaj al sia medio, ĉefe al la akva kvalito, estas malfacile konserveblaj en kaptiveco. Do, nur 4 farmoj de bredado ekzistas en la mondo : unu en Britio (Kimrio),

unu en Germanio, unu grandega apud Moskvo (cento da dungitoj) kaj unu en Francio, en Ĝirondio. Ĉe la baseno de Arcachon, en Audenge (proksimume 40 km de Bordeaux), la societo Ricarimpex bredas milionojn da hirudoj en deko da basenoj. Ĉi tiuj, naturaj, estas kreitaj en 1845, jam por hirudobredado.

Jeannine kaj Gérard Layseman tradukis el "Chasseur Français", septembro 2013

ĈARLOTKUKO

KUN ABRIKOTOJ KAJ MIGDALOJ

- 30 kulerbiskvitoj
- 1 granda skatolo da siropaj abrikotoj
- 500 g da kazeo
- 3 aŭ 4 supkuleroj da sukero laŭ la gusto
- 100 g da migdaloj
- 3 folioj da gelateno

Elgutigu la abrikotojn.

Sorbigu la biskvitojn en la fruktosuko.

Kovru la fundon kaj la parietojn de la muldilo pere de la biskvitoj (konveska flanko ĉe la ekstero).

Metu la gelatenon en malvarman akvon dum 10 minutoj. Poste, prenu kaj premu ĝin por eltiri la akvon.

Varmigu iomete da kazeo kaj aldonu la gelatenon. Miksu ĝis la solviĝo de la gelateno.

Poste, aldonu tiun preparaĵon al la resto de la kazeo. Sukeru ĝin.

Aldonu la abrikotojn pecigitajn kaj la migdalojn tranĉitajn en etaj pecetoj.

Verŝu la tuton en la muldilon kaj kovru la supron per tavolo de biskvitoj.

Metu la ĉarlotkukon en fridujo dum pluraj horoj.

Elmuldigu la ĉarlotkukon ĵus antaŭ la gustumado.

Somere, oni povas uzi freŝajn abrikotojn poĉitajn en sukera siropo.

Oni povas ankaŭ aldoni frambosukon al la kazeo por havi alian guston.

Jeannine kaj Gérard Layseman

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr